

Svisa Esperanto-Societo

# informas

jaro 2010 numero 3-a: julio-oktobro  
dissendo je la 18-a de aŭgusto



Profesoro OKAMOTO Mitsuo

OKAMOTO Mitsuo naskiĝis en Tòkyo kaj travivis la militon kiel infano. Li enkondukis pacologion kiel universitatan fakon (en la germana : Friedensforschung, en la franca : irénologie, en la angla : peace studies) kaj instruis en pluraj universitatoj en Eŭropo kaj en Usono. Li nun estas 75-jara kaj diligente lernas esperanton. Li loĝas en Hiroshima. Longa intervjuo de li troviĝas en la franca kaj en la germana sur la retejo de Svisa Asocio de Edukistoj al la Paco [www.asepaix.ch](http://www.asepaix.ch). Kiam Mireille Grosjean demandis al li en 2009, kio estas lia plej elkora deziro por la mondo, tiam li respondis : « *Enkonduko de Esperanto !* »

# Rememorigilo

## *SES informas*

### Redakcio :

Claude Gacond, Str. Chevreuils  
14, CH-2300 La Chaux-de-Fonds

Retpoŝto : [gacond@bluewin.ch](mailto:gacond@bluewin.ch)

Tel. : hejme: 032 926 52 32  
ĉe CDELI : 032 967 68 42

Redaktaj kunlaborantoj:

Nancy Fontannaz, Stefano Keller,  
Richard Schneller

## *SES informas*

### Redaktaj datlimoj

2010-4 : novembro-decembro :  
oktobre 10, dissendo 1-an de novembro.

2011-1 : januaro-marto :  
januare 10, dissendo 1-an de februaro.

2011-2 : aprilo-junio :  
marte 10, dissendo 1-an de aprilo.

2011 3 : julio-oktobro :  
julie 1, dissendo 15-an de aŭgusto.

**Konsultu la retejon de SES !**

[www.svisa-esperanto-societo.ch](http://www.svisa-esperanto-societo.ch)

## SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto, Grand-Rue  
9, 2416 Les Brenets. Tel.: 032 932 18 88 kaj  
079 69 709 66.

Retpoŝto : [mirejo.mireille@gmail.com](mailto:mirejo.mireille@gmail.com)

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, Archstr.  
2, 8610 Uster. Tel. : 044 251 50 25.

Retpoŝto : [info@esperanto.ch](mailto:info@esperanto.ch)

Stefano Keller, sekretario, CP 6034, 1002  
Lausanne. Tel. : 076 261 06 09.

Retpoŝto : [kellerstefano@gmail.com](mailto:kellerstefano@gmail.com)

Marie-Louise Münger, kasisto, Rue Centrale  
4, 2112 Môtiers. Tel. : 032 861 26 28.

Retpoŝto : [ml.munger@bluewin.ch](mailto:ml.munger@bluewin.ch)

Nelida Weidmann González, respondeca por  
familiaj renkontiĝoj kaj aktivecoj. Archstr. 2,  
8610 Uster. Tel. : 044 251 50 25.

Poŝta ĉekokonto :

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo  
2300 La Chaux-de-Fonds


## Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

# Vivo de SES

2010-3, ekredaktis: Stefano Keller, finredaktis: Claude Gacond



## ***Protokolo de la Ĝenerala Kunveno, okazinta la 17an de aprilo 2010 Wil, Restoracio Freihof, 11h00***

Estraro partoprenanta :

- *Mireille Grosjean*, kun-prezidanto
- *Dietrich Weidmann*, kun-prezidanto
- *Hans-Werner Grossmann*, kasisto
- *Nelida Weidmann*, estrarano

Senkulpiĝoj :

- *Stefano Keller*, sekretario.
- Konrad Rey, Hans Meier, Arletta Di Vetta, Alain Favre, Bernard Nicolet, Nicole Beroud-Focke, Jean-Claude Roget, Jean-Tierry von Büren, Claude kaj Andrée Gacond.

Tagordo :

1. Salutado, konstato de la nombro de ĉeestantoj, informo pri senkulpiĝoj
2. Aprobo de la tagordo
3. Elekto de voĉnombrantoj
4. Evoluo de la membraro
5. Aprobo de la protokolo de la ĝenerala kunveno 2009
6. Vivo de la societo: aprobo de la estrarraporto
7. Financoj: prezento kaj aprobo
8. Konsisto de la estraro, elekto de la estraranoj
9. Elekto de kaskontrolantoj
10. Projektoj por 2010
11. JES, SIS, SFERO, SAT, SAT-Amikaro, Pasporta Servo, Svisa Koruso
12. Buĝeto 2010
13. Diversaĵoj

## **1. Salutado, konstato de la nombro de ĉeestantoj, informo pri senkulpiĝoj**

*Mireille Grosjean* salutas la ĉeestantojn. Ĉeestas 35 personoj (erare *Mireille Grosjean* unue anoncis 38). Ŝi senkulpigas la sekretarion *Stefanon Keller* kaj aliajn personojn (vidu supre).

## **2. Aprobo de la tagordo**

La tagordo aprobitas unuanime.

## **3. Elekto de voĉnombrantoj**

Kiel voĉnombrantoj elektitas unuanime *Barbara Pochanke* kaj *Liliane Sigrist*.

## **4. Evoluo de la membraro**

*Hans-Werner Grossmann* raportas, ke la nombro de la membraro stagnas ekde multaj jaroj ĉe ĉirkaŭ 150 pagantaj membroj. Ĉi-jare 17 personoj malmembriĝis kaj 17 personoj ekmembriĝis.

*Mireille Grosjean* rimarkas, ke estas nuntempe same en ĉiuj asocioj krom en sportasocioj. Ĉe ni junuloj ne sufiĉe venas. Stagni jam estas sukceso. 80 de niaj membroj estas membroj ankaŭ de UEA.

*Nicole Margot* volas scii, kiel oni elektas komitatanojn de UEA. *Mireille Grosjean* (kiel komitatano A por Svisio) klarigas, ke estas membroj A elektitaj de la landaj asocioj (po unu por ĉiuj mil membroj de iu landa asocio, sume ĉirkaŭ 80); membroj B elektitaj de la membroj de UEA; el ili membroj A povas esti elektitaj. Membroj A kaj B elektas membrojn C pro ties apartaj spertoj. Aldone estas kelkaj miloj de fakdelegitoj.

## **5. Aprobo de la protokolo de la ĝenerala kunveno 2009**

La protokolo (aperinta en *SES informas 2009-3*) aprobitas unuanime.

## **6. Vivo de la societo: Aprobo de la estrarraporto**

La estrarraporto (aperinta en *SES informas 2010-1*) aprobitas kun 3 sindetenoj (ĉi-lastaj personoj diris, ke la kialo de la sindeteno estas, ke ili ne legis la raporton).

## **7. Financoj: Prezento kaj aprobo**

Jarkalkulo kaj bilanco aperis en *SES informas 2010-2*. En 2009 estis plielspezoj de CHF 4994.50. *Hans-Werner Grossmann* diras, ke estraro decidis uzi la monon favore al Esperanto, ne akumuli ĝin. Tamen en 2009 ĝi ne trafis la bonajn rimedojn. Responde al librotenada demando de *Nicole Margot*, li klarigis, ke oni vidas la kostojn de la konkurso (CHF 8111.35) sub la aparta konto 3020. SES ankaŭ subtenas SFERO-n, kulturajn eventojn, organizon de SES kunveno. La asembleo kore dankas la kasiston pro lia longdaŭra laboro kaj

aprobos unuanime la jarkalkulon 2009 kaj bilancon de 2009-12-31.

### **8. Konsisto de la estraro, elekto de la estraranoj**

*Mireille Grosjean* diras, ke la estraro funkcias bone kun personoj kaj el Romandio kaj el alemana Svisio, ekvilibre konsistanta el viroj kaj virinoj. Ŝi anoncas, ke *Hans-Werner Grossmann* volas retiriĝi el la kasista funkcio. Ŝi dankas lin pro lia 8-jara bona servado.

*Marie-Louise Münger* transprenos la kasistajn taskojn, ĉar ŝi volas kontribui al SES. Sed volonte pretus doni la taskon ankaŭ en alies manojn.

La asembleo aprobas unuanime la jenan estraron :

- *Mireille Grosjean*, kun-prezidanto (ĝisnuna)
- *Dietrich Weidmann*, kun-prezidanto (ĝisnuna)
- *Stefano Keller* (sekretario ĝisnuna)
- *Marie-Louise Münger* (kasisto nova)
- *Nelida Weidmann* (estaro ĝisnuna)

### **9. Elekto de kaskontrolantoj**

La ĝisnunaj kaskontrolantoj *Barbara Pochanke* kaj *Dieter Rooke* pretas plu plenumi sian taskon. La asembleo aprobas ilin unuanime kaj dankas aplaŭde.

### **10. Projektoj por 2010**

*Mireille Grosjean* rakontas, ke oni lastjare havis grandan projekton (la konkurso) kaj en 2011 okazos iu pli granda evento en Richterswil. Dum 2010 oni ne estos tre aktiva. Oni devus pensi pri la regionoj, interalie pri Tiĉino, eĉ se tie estas nur tri esperantistoj (unu el ili estas membro en *Pasporta Servo*, *Mireille Grosjean* vizitis lin).

*Wolfram Fischer* demandas ĉu la estraro starigis celojn. *Mireille Grosjean* respondas, ke la celoj estas 1) informado pri la ekzisto de esperanto, 2) instigo por lerni esperanton, 3) instigo por membriĝi en esperantaj anaroj. Koncerne la informadon oni celis ĉefe instruistojn kaj parlamentanojn. *Mireille Grosjean* pretigas dokumentojn dufoje jare, kiujn ŝi sendas al 160 adresoj, inter ili moŝtuloj kiel federala konsilanto Calmy-Rey; *Stefano Keller* prizorgas la retpaĝojn de SES. Krome la estraranoj pretigas gazetartikolojn kaj dissendas gazetarajn komunikojn. *Wolfram Fischer* rimarkas, ke la retejo [www.esperanto.ch](http://www.esperanto.ch) ne estas bone farita kaj ke laŭ lia opinio ne devus esti retejo de entrepreno sed nur de esperanto (precizigo: la retejo <http://esperanto.ch> apartenas al Allsprachendienst Esperanto GmbH, la retejo de SES estas <http://www.svisa-esperanto-societo.ch>). *Dietrich Weidmann* (posedanto ankaŭ de Allsprachendienst) diras, ke la ĉefa problemo estas manko de homfortoj por flegi kaj aktualigi la esperantajn paĝojn de la retejoj – tial la problemo de

aktuala retejo ne estas solvebla per unufoja investo por bela aspekto. *Wolfram Fischer* proponas diskuti pri tio, kion oni povus fari kun CHF 8000, la sumo kiun oni uzis por la konkurso. *Mireille Grosjean* volonte ricevos ĉi-rilatajn proponojn.

*Liliane Sigrist* mencias la televidan elsendaĵon «Bi dä Lüt» de la svisa televido, kie oni povus prezenti ankaŭ esperantan klubon. *Mireille Grosjean* rememoras pri Sabine Gisiger, televida redaktoro kaj iama ŝia lernantino. Ŝi volas kontakti ŝin.

*Nicole Margot* mencias, ke alia celo estas renkontoj inter la svisaj regionoj, kiaj okazis antaŭe post instigo de SES. *Dietrich Weidmann* diras, ke la homoj devas esti pretaj kaj mem organizi tiajn eventojn. *Mireille Grosjean* diras, ke la ĝenerala kunveno de SES nun okazas en orienta Svislando, sed en 2011 ĝi okazos en Romandio (en la ludmuzeo en La Tour-de-Peilz, kie Cesco Reale, nova fervora kaj lingve tre talenta esperantisto, laboras).

*Mireille Grosjean* mencias la svisan esperantan retliston [svislando@yahoogroups.com](mailto:svislando@yahoogroups.com) Partoprenemuloj povas aliĝi ĉe *Stefano Keller*. Oni petas publikigi la aliĝ-formalaĵojn.

*Elisabeth de Mestral* proponas fari retan kalendaron kun aldoneblaj raportoj. *István Moroz* laŭdas la Yahoo-grupon pro la rapideco de la disvastigo de informoj kaj ke tiamaniere oni ne bezonas fakulon. *Mireille Grosjean* informas, ke ŝi ne ricevis iun ajn respondon post sia anonco pri la svisa vojaĝo de Johan Derks el Nederlando, aldonante, ke ŝi sendas retmesaĝojn, kiujn oni ricevas aŭtomate. *Elisabeth de Mestral* ŝatus trovi bone ordigitajn informojn, kiujn oni povas rigardi, kiam oni bezonas ilin.

Post demando de *Wolfram Fischer*, *Dietrich Weidmann* klarigas, ke *Claude Gacond* pretigas la kalendaron de la bulteno *SES informas*, sed ke li ne povas zorgi ankaŭ pri elektronika versio.

*Dietrich Weidmann* diras, ke necesas antaŭvidi la momenton, kiam *Claude Gacond* ne plu povos plenumi la redaktoran taskon de *SES informas* kaj tiam necesos ĝustatempe trovi novan redaktoron por la organo aŭ eĉ pli bone: tutan redaktan teamon.

*Dominique de Mestral* demandas, ĉu oni bezonas ankoraŭ paperan version, aŭ ĉu elektronika sufiĉus. Diversaj partoprenantoj esprimis la deziron, ke aktuala kalendaro pri la eventoj en Svislando aperu ne nur en *SES-informas*, sed ankaŭ rete. *Mireille Grosjean* informas, ke oni planas fari enketon pri tiu kaj aliaj demandoj. *Richard Schneller* mencias, ke oni komencis fari elektronikajn

versiojn de partoj de SESi, sed nur tri numeroj aperis ĝis nun.

*Marie-Louise Münger* rememorigas, ke ni devas decidi, kien meti nian fortojn : ĉu en la informado al la publiko aŭ en la preparado de internaj informoj. *Dietrich Weidmann* raportas koncerne la publikan intereson pri lia retejo «esperanto.ch», ke ĝi havas milojn da alklakoj ĉiutage.

## **11. JES, SIS, SFERO, SAT, SAT-Amikaro, Pasporta Servo, Svisa Koruso**

*Mireille Grosjean* ĝoje raportas pri grupoj aktivaj en Svislando :

- JES: Junularo Esperanta Svisa. *Luc Allemand* raportas, ke ne estas multa aktiveco momente.
- SIS: Svisa ILEI Sekcio.
- SFERO: Svisa Feria Esperanta Renkontiĝo. *Wolfram Fischer* raportas pri la semajnfino en Lenk en aŭtuno 2009 (kun preskaŭ 50 partoprenantoj). Por 2010 (en Métabief) kaj 2011 (en Richterswil) du organizantaj teamoj formiĝis. Por 2010 la teamo konsistas el *Mara Bartoli*, *Nelida Weidmann* kaj *Wolfram Fischer*. Por 2011 la teamo konsistas el *Nelida Weidmann*, *Marion Bélisle*, *Mireille Grosjean* kaj *Linda Weidmann*.
- SAT: Sennacieca Asocio Tutmonda. *Richard Schneller*, kiu transprenis la respondecon pri SAT por Svislando, raportas, ke SAT eldonas dumonate gazeton kaj jaran revuon. La SAT-kongreso en 2010 okazos en Rumanio. SAT estas asocio de esperantaj laboristoj.
- SAT-Amikaro. *Mireille Grosjean*, prezidanto de SES, raportas, ke oni trovas multajn bonajn tekstojn sur ĝia retejo.
- *Pasporta Servo*: Tutmonda esperanta gastiga servo. *Luc Allemand*, respondeculo por Svislando, informas, ke post 2009 sen libreto, oni denove eldonos paperan version de la listo por 2010 baze de la retaj informoj. Se iu ne volas retumi, oni povas sendi la informojn ankaŭ al li.
- Svisa Koruso: Sub la gvido de *Elisabeth de Mestral* kaj helpe de *Verena Chaves* la koruso preparis kantojn unuafoje kun kantistoj kaj el Romandio kaj el alemana Svisio. La estraro tre ĝojas pri tio.

## **12. Buĝeto 2010**

La buĝeto 2010 montras plielspezojn de CHF 3350. *Hans-Werner Grossmann* diras, ke ankaŭ ĉi-jare oni volas investi monon favore al Esperanto. La asembleo aprobas la buĝeton unuanime.

### 13. Diversaĵoj

*Nicole Margot* prezentas numerojn de la revuo *Etnismo*. *Mireille Grosjean* informas pri UNIFEM, organizaĵo de UNO por virinoj.

Fino de la kunveno je 12h35. Protokolis *Wolfram Fischer*, 2010-04-27.



### *Rememorigo:*



## *Svisa Feria Esperanta Renkontiĝo SFERO \* 14a-17a de oktobro 2010*


---

Tiufoje SFERO okazos en la feridomo “Les Sapins de l’Amitié”, en Métabief, Francio, tute apud Vallorbe (VD), Svislando.

Pliajn informojn pri loĝado kaj prezoj vi trovos sub: [www.esperanto.ch/sfero](http://www.esperanto.ch/sfero)

Aliĝu tuj per

- retmesaĝo al: [nelida@esperanto.ch](mailto:nelida@esperanto.ch)
- telefone: 044 251 50 25 (lu-ve, 10h00-12h00 kaj 14h30-15h00)





## Nia sekretario Stefano Keller estis akcidentita



Fine de junio Stefano Keller falis de biciklo kontraŭ arbon ĉe subiranta laŭzana strato kaj kiel montras la foto rompiĝis lia dekstra brako. Sveninta li estis ambulate transportita al proksima kliniko, kie oni konstatis brakorompiĝon kaj prizorgis lin. Li ja ridetas sur tiu bildo, sed tamen pro doloroj ĉefe en ŝvelanta mano li travivis ses-semajnan handicapitecon. Nun li provas lerni tajpi per la nuraj maldekstraj fingroj kaj senkulpiĝas pro sia administra malakurateco. Ni esprimas al li niajn bondezirojn al plena resaniĝo.



### **Enketilo respondinda**

Nia prezidantino Mireille Grosjean esperas, ke ĉiuj akceptos respondi al la enketilo, kiu akompanas tiun ĉi bultenon. Tiu dokumento ankaŭ rete konsulteblas ĉe : <http://www.svisa-esperanto-societo.ch/enketo>

# Tutsvisa aktiveco

## CDELI

**Centro de Dokumentado kaj  
Esploro pri la Lingvo Internacia**

Bibliothèque de la Ville, Progrès 33

CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds

Tel. : 032 967 68 42.

[claude.gacond@ne.ch](mailto:claude.gacond@ne.ch)

[martine.schneller@ne.ch](mailto:martine.schneller@ne.ch)

[nancy.fontannaz@ne.ch](mailto:nancy.fontannaz@ne.ch)

### Venontaj stud-aranĝoj !

**Atentu : Aliĝo al la studsabato de la 25a de septembro estu direktita al Monika Molnar, ĉar tiam Nancy Fontannaz ferios. Tel: 032 961 15 75 (kun mesaĝregistrilo) aŭ rete : [esperanto-momix@yahoo.it](mailto:esperanto-momix@yahoo.it)**

**Didaktika stud-sabato** okazas principe la trian sabaton de la monato en neferia periodo helpe al ĉiuj esperanto-lernantoj : tutkomencantoj, komencantoj kaj progresantoj. Instruas Monika Molnar, Nancy Fontannaz kaj Luc Allemand. Rezervu la sekvajn sabatojn : **septembre 25, oktobre 23, novembre 20, decembre 18, 2011 januare 22, februare 19, Marte 19.**

Informilo en la franca kaj germana pri la studsabatoj akompanas nian bultenon pro la espero, ke la lokaj grupoj ilin reproduktos kaj diskonigos. Tiu regula studeblo de esperanto helpu al iliaj propraj kursanoj.

Kial eĉ ne organizi grupan partoprenon al tiuj studsabatoj ?

**La Kultura Seminario** reokazos principe la unuan sabaton de la monato ekde oktobro, **kaj ne en septembro**. Studemuloj do rezervu la sekvajn sabatojn : **oktobre 2, novembre 6 kaj decembre 4, 2011 februare 5, Marte 5.**

Unu el la studtemoj estos la vortfarado en Esperanto. Antaŭ ekzakte cent jaroj, tio estas en 1910, René de Saussure, rebate al la kritikoj de Louis Couturat, proponis vortfaradan principaron, kiu ankoraŭ nun, almenaŭ didaktike, estas ĝenerale akceptita. Lia verko firmigis la pozicion de Esperanto kontraŭ la Ido-skismo. En la tridekaj jaroj Kálmán Kalocsay kaj Gaston Waringhien, en sia epokfara *Plena Gramatiko de Esperanto*, iom tro detale precizigis tiujn vortfaradajn regulojn. Siavice en 1976 ilian gravan verkon kritikis la lingvisto István Szerdahelyi en la deka kajero de la kolekto *Studoj* de KCE. Ni ekzamenos la gramatikajn hezitojn de la unuaj esperantistoj (kaj de la Esperanto-lernantoj), malkovros la sinsekvajn kontribuojn de Saussure, Kalocsay, Waringhien kaj Szerdahelyi, jen unu el la objektoj de la venonta kurssesio. Sed aliaj temoj ankaŭ okupos nin: legaĵoj, malkovro de verkistoj, respondo al primovadaj kaj prilingvaj demandoj, ktp.

Claude Gacond.

# ILEI

Svisa sekcio. Mireille Grosjean,  
Grand-Rue 9, 2416 Les Brenets  
[mirejo-mireille@gmail.com](mailto:mirejo-mireille@gmail.com)

## Svisaj membroj de ILEI

Je la 18a de majo 2010 la membroj  
de la Svisa ILEI-Sekcio estis :

Luc Allemand, La Chaux-de-Fonds.

Nicole Béroud-Focke, Basel.

Lucienne Dovat, Renens.

Alain Favre, FR-74140 Douvaine.

Nancy Fontannaz, Pully.

Jean-Noël Friot, Satigny.

Claude Gacond, La Chaux-de-Fonds.

Mireille Grosjean, Les Brenets.

Stefano Keller, Lausanne.

Jean-Jacques Lavanchy, La Tour-de-  
Peilz.

Nicole Margot, Lausanne.

Monika Molnar, La Chaux-du-  
Milieu.

François Randin, Lausanne.


Daniel Schoeni Bartoli, Prilly.

Jean-Thierry Von Büren, Savagnier.

Dietrich Weidmann, Uster.

Véta Zaslavsky, La Chaux-de-  
Fonds.

-oOo-



# Loka vivo

## Basel

### Esperanto-Societo Basel

PF 178, 4005 Basel

Tel. : 0049 76 214 57 12.

Kunvenoj : 20h00 en la kelo de la  
malantaŭa domo, Riehenring 129.

[esperantobasel@gmx.ch](mailto:esperantobasel@gmx.ch)

PC : 40-33714-4

Jarkotizo unuopa : Fr 25.-, paro : Fr 30.-

### Venontaj kunvenoj

**Aŭguste 26** : Hans-Peter Seen pre-  
zentos siajn bildojn.

**Septembre 12** : Migrado al *La  
Petite Camargue Alsacienne* apud  
Saint-Louis. Detalaj informoj pri la  
rendevuo je la 10h00 kaj pri tiu  
interesa migrado riceveblas tra :

[bertrand.wick@wanado.fr](mailto:bertrand.wick@wanado.fr)

**OktoBRE 28** : Ni parolos pri niaj  
ferioj.

**Novembre 25** : Programo 2011.

**Decembre** : Zamenhofa festo en  
Francio organizita de la grupo de  
Mulhouse.

-oOo-

# Bern

S-ro Ueli Haenni, Linckweg 2,  
Postfach, CH-3052 Zollikofen.

Telefona : 031 911 64 72 (kun respon-  
dilo) aŭ oficeje 031 911 23 22.

[ueli.haenni@swissonline.ch](mailto:ueli.haenni@swissonline.ch)

## Raporto

Tiel raportas Ueli Haenni pri la kunveno okazinta la 15an de majo en lia hejmo en Zollikofen sekve al lia alkovo : « *Ege interesaj estis por ĉiuj la bildoj kaj objektoj el Japanio, kiujn kunportis kaj vidigis Mireille Grosjean. Ŝin aŭskultis kun atento 5 personoj krom la prezentantino mem.* »

En sia serĉado de regule kunvenejo en Berno Ueli Haenni malkovris kaj vizitis novan restoracieton, kiu estas nomata **Esperanto** en la kvartalo Wandorf. Ĝi atingeblas ĉu fervoje, ĉu per la busa linio 20. Jen kion anoncas la telefonlibra priskribo : **Restaurant Esperanto Take-Away, Winkelriedstr. 42, 3014 Bern. Tel.: 031 332 22 90.**

Tiel raportas Ueli Haenni pri sia unua renkonto kun la restoraciestro s-ro Murat : « *Li elektis la nomon Esperanto, ĉar li esperas gastigi plej diversnaciajn kaj diverslingvajn klientojn ĉe si, sed la lingvon Esperanto li ne (jam) scipovas.* »

Sekve al tiu vizito per verda informilo Ueli Haenni proponis unuan renkonton en tiu restoracio **Esperanto** por la 15a de junio. Ĉeestis tiun rendezuon kun Ueli Haenni Willy Nüesch, Bruno Graf kaj interesulo d-ro π. Pluraj alportis

librojn kaj dokumentojn pri Esperanto por riĉigi la restacietan bibliotekon, kiu estas je la dispono de la klientoj.

## Nova kunvenpropono

Sekve al tiu sukceseto Ueli Haenni proponas novan kunvenon en tiu restoracieto Esperanto en Berno por la merkado 15a de septembro je la 19h15 kaj li anoncas, ke ĉeestos esperantista gasto ĝis minimume je la 21h00. Kiel diskuta temo por la kunveno li proponas K O L E R O , ĉar kadre de kultura aranĝo en Berno mem, kiu okazas nur ĉiun duan jaron, la "**Bi-ennale Bern**", estos multaj plej diversaj dancoj kaj aliaĵoj pri la koncerna temo, de Bern-urba scenejo ĝis la botanika ĝardeno de Bern, ankaŭ en Reithalle dancos Sudafrikano mondkonata, fiere kun li kantos la ĥoruso de Ueli, la dimanĉon kaj lundon vespere la 13an de septembro. La bernanoj povas mem kontribui, ĉiu iru antaŭe spekti ian kulturaĵon dum la kelkaj tagoj antaŭ la merkredo 15a de septembro, jen la propono de Ueli Haenni. Kaj pri la esperanto-renkonto proponita li aldonas: Dum la "kolera kunveno", ni sidos sur la verdaj seĝoj de la restoracio Esperanto kaj rakontos niajn spertojn, eĉ al eblaj ĉeestontaj esperantistoj, kiuj ne partoprenis la prezentojn de la antaŭa semajno. Ĉeestos la aranĝon ankaŭ fakulino el la urbo Rheydt en Germanio: Jessica Dehms, esperantisto, kiu dum 7 semajnoj plentempe laboras jam ekde la 15a de aŭgusto kaj plu laboros en la organiza oficejo de:

[www.biennale-bern.ch](http://www.biennale-bern.ch).

Kun antaŭĝojo koleri kune do esperas vin renkonti Ueli Haenni, kontaktebla je Fellenbergstr. 8, Postfach, 3052 Zollikofen, Telefone 031 911 .64 72 (bonvolu paroli al la respondilo) - aŭ provu telefonvoki oficeje 031 911 23 22, aŭ retroŝte sed neniam sendu retroŝte pli ol 50 kiloBajtojn :

[ueli.haenni@swissonline.ch](mailto:ueli.haenni@swissonline.ch).

-oOo-

## Genève

### Esperanto-Grupo „La Stelo“

Case postale 734, 1212 Grand-Lancy 1

Tel. : 022 771 24 37

La kunvenoj okazas en Maison des Associations, rue des Savoises 15

### Somera ekskurso

21an de aŭgusto

al la Svisa Muzeo de la ludoj  
en La Tour de Peilz.

#### Trajna horaro:

10h36 : foriro.

Alveno en La Tour de Peilz: 11h52.

La Stelo pagas la enir- kaj vizit-  
kostojn al siaj membroj.

## Raportoj

### Memore al Claude Piron

Al la Domo de la Asocioj la 7an de aprilo eĉ de malproksime venis la partoprenantoj al la kunsido de la ĝeneva grupo La Stelo por elvoki la memoron de Claude Piron.

Multis emocio kompreneble, ĉar Claude Piron estis la centra kolono de la societo dum jardekoj. Dum lia vivo ĉiuj konsciis la gravecon de lia

ĉeesto. Lia forpaso plifortigis tiun certecon.

Kun la lerta stilo kaj la tiel melodia Esperanto, kiuj ŝin karakterizas, Anita Altherr revivigis Claude Piron per multaj diapozitivoj. Tiuj fotoj klarigis lian vojon tra la esperanta mondo, unue kiam li estis ankoraŭ juna viro, poste kiel plenkreskulo kaj fine kun blankaj haroj. Bela perspektivo, kiu ebligis kvazaŭ mezuri la distancon iritan, la aventuron de lia vivo kaj la gravecon de liaj verkoj.

La dua parto de la prezentado fokusiĝis je la lingvistika alporto de Claude Piron. Konstruita sur ekzemploj elektitaj el liaj libroj, tiu parto estis vera leciono de Esperanto centrigita sur tio, kio precipe karakterizas lian verkaron, tio estas la eksterordinara forto de lia krekapablo. Tion la partoprenantoj al la kunsido povis konstati analizante perlojn kolektitajn de Anita Altherr. Ŝajnas, ke la vortkreado por esprimi pli precize proprajn pensojn estis por li vera kaj konstanta plezuro.

La vespero finiĝis do en etoso de entuziasmo, kiu certe estus plaĉinta al Claude Piron. Alia elvoka vespero estos dediĉita al li per studo de lia libro *Le Défi des Langues*, kun muziko, io kio ankaŭ apartenas plene al la esperanta mondo de Claude Piron.

Laŭ Markus Sanz

### Vespero dediĉita al poezio

Okaze de la kunveno de la 14a de aprilo la vespero estis dediĉita al poeziaj emocioj post prokrasto de

diskuto pri la estonteco de la bulteno *Brasikfolio*.

Anita Altherr gvidis la ĉeestantojn tra la paĝaro de la *Svisa Antologio* redaktita de Arthur Baur komence de la pasinta jarcento.

Ŝi pretigis promenadon tra la kvar lingvo-regionoj de Svislando kaj la partoprenantoj kunlaboris per laŭvica legado de elektitaj poemoj. Tiu laŭtvoĉa legado kaŭzis kelkfoje debatojn, ĉu pri la enhavo mem de kelkaj rimaĵoj spegulantaj sociajn rilatojn, kiuj regis dum la antaŭaj jarcentoj, ĉu pri la interpreto de aliaj, ne tuj travideblaj.

Ravis nin multaj poemoj, emociaj vivobildigoj ne nur de blankaj rok-pintoj, sed ankaŭ de golfoj blue brilaj aŭ de fiere ŝveligitaj veloj.

Kaj pri la nuntempaj poetoj ?

Ĉu ili ankoraŭ sopiras al virga naturo, al ĉarmaj vilaĝoj ?

Laŭ François Stride.

## **Esperanto-Genève-Régions ĉe la Geneva Libro-Foiro**

Ĉijare fine de aprilo konkurencis nin bedaŭrinde belega vetero dum la tri unuaj tagoj de la Libro-Foiro. Do de merkredo ĝis vendredo ni havis ege malmultajn vizitantojn – fakte ne nur ni, sed ankaŭ ĉiuj budistoj plendis. Poste ekpluvis la sabaton kaj dimanĉon, kaj tial ni havis pli da vizitantoj, ĉefe posttagmeze.

Tamen je la unua merkreda mateno vizitis nin kvar knaboj, kiuj rigardis kun vigla intereso nian etan ekspozicion pri svisaj esperantistoj. Ili rekonis la foton de Claude Piron kaj klarigis al ni, ke instruisto en ilia

lernejo parolis pri Esperanto kaj legis tekston verkitan de Claude Piron. Kompreneble ni donis al ili multajn broŝurojn kaj esperantogramatikon !

La ekspozicio pri svisaj esperantistoj estis la pluso ĉe nia budo ĉi jare, laŭ ideo de Martine Moine. Ĝi enhavis grandajn afiŝojn de kvar el la gravaj pioniroj - Edmond Privat, Hector Hodler, Edouard Stettler kaj René de Saussure. Pli malgrandaj afiŝoj montris kelkajn el la sekvintoj - Madeleine Stakian, Claude Piron, Anita Altherr, Claude Gacond, Bruno Graf, Mireille Grosjean, Dietrich Weidmann, Andreas Künzli, kaj la juna Mélanie Maradan, kiu reprezentas la novan generacion. Kompreneble ni ja estus povintaj elekti pliajn homojn, sed loko mankis !

Niaj vizitantoj ĉijare ŝajnis multe pli bone informitaj pri Esperanto kaj vigle diskutis kun ni. Du sinjoroj, kiuj venis kun infano, diris al ni : "Bonvolu klarigi al la infano, kio estas Esperanto !" – Estis vera defio, kaj mi esperas, ke ni sukcesis ! Ankaŭ estis granda kontentiĝo kaj plezuro, ke kelkaj kuraĝaj Esperanto-lernantoj vizitis nin – kaj same komencantoj kaj progresantoj.

Ni ege ĝuis pri la vizito de Mireille Grosjean, kiu akompanis Sinjoron Hubert Guézo - viro el Benino, kiu verkis tri librojn por la infanoj, kies celo estas instrui la historion de Afriko pere de ludoj - tre belaj libroj, kiuj respondas al granda bezono, ĉar la transdono de la historio de Afriko estis rompita. Mireille subtene ĉeestis la afrikan budon kaj ankaŭ por

trovi distribuantojn por la libroj.  
Tiurilate mi instigas konsulti la  
retejon :

[www.daadacom.fr/vente.php](http://www.daadacom.fr/vente.php)

Ni esperas, ke nia ĉeesto estis utila,  
ni ja disdonis multajn broŝurojn,  
inklude de du novaj, unu pri la  
ekspozicio mem, kaj alian pri  
*L'Espéranto et sa philosophie*. Ni  
ankaŭ proponis dokumentojn pri  
lingvaj rajtoj kaj pri subteno al  
minoritataj lingvoj uzatajn ĉe Unu-  
iĝintaj Nacioj. Kompreneble ni dis-  
donegis paĝ-indikilojn donitajn de  
Espéranto-France - dankon al ili !  
Dankon ankaŭ al Andreas Künzli pro  
lia enciklopedio *Universalaj Lingvoj  
en Svislando*, kiun ni uzis kiel fonton  
por la ekspozicio, kaj specialan  
dankon al Armène Stakian. kiu tiom  
afable sendis al ni belajn fotojn de  
sia patrino Madeleine Stakian.

La deĵorista teamo de la budo estis  
multnombra ĉi-jare - dankon al Yves  
Buttex, Didier Cornuet, Armand  
Cotton, Charlie kaj Suzanne Du-  
mont, Georgette Friedly, Ghyslaine  
Gantert, Jean-Loup Gaudin, Mélanie  
Maradan, Martine Moine, Claude  
Scholl, Paula Vité kaj Richard  
Wilson, kaj specialan dankon al  
Jean-Loup, Ghyslaine kaj Richard,  
kiuj helpis al ni por munti kaj el-  
munti la budon.

Raportas Charmian Common kaj  
Marie Zoller.

-oOo-

# Lausanne

## Laŭzana Esperanto-Societo

CP 246, 1000 Lausanne 22.

Tel : 021 647 29 28

076 411 14 55

[esperanto@citycable.ch](mailto:esperanto@citycable.ch)

CCP : 10-26785-8

[www.esperanto.ch/Lausanne](http://www.esperanto.ch/Lausanne)

Kunvenoj : Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun  
unuan lundon en la monato je la 20h00.

Komitato : Prezidanto : David Bühlmann  
Tel. 021 624 36 38 ; Vicprezidanto :  
Charlotte Blanc Maillard 079 393 32 63 ;  
Sekretario : François Randin 076 411 14  
55 ; Kasisto : Sonia Daubercies 079 649 88  
86.

## Neordinara programo

### Vizito de André Cherpillod

#### Vendrede la 3an de septembro :

16h00 : alveno de André Cherpillod.

#### En Valembreuse (aliĝo) :

19h00-20h30 : babilada rondo kun  
André Cherpillod.

20h30-23h00 : kanada manĝo.

#### Sabate la 4an de septembro :

9h00-12h00 : stando en la bazaro.

15h00-17h00 : vizito de Nestlé en  
Broc (Aliĝoj : 10 pers.)

17h00-19h00 : vizito de Gruyères.

19h00-22h00 : manĝo en Gruyères.

#### Dimanĉe la 5-an de septembro :

#### En Valembreuse (aliĝo) :

8h30-12h00 : Unua seminario kun  
André Cherpillod pri *La refleksivo*.

12h00-14h00 : grilaĵoj.

14h00-17h00 : Dua seminario kun  
André Cherpillod pri *La eraroj ofte  
troveblaj en la lernolibroj* kaj  
franclingve troisième séminaire avec  
André Cherpillod sur *L'histoire des  
chiffres*.

17h00-22h00 : manĝo en la Matoule.

**Lunde la 6-an de septembro :**

14h00-17h00 : vizito de Laŭzano

18h00-20h00 : manĝo en la bufedo stacidoma.

20h00-22h00 : prelego de André Cherpillod en la salono bufeda (aliĝo) pri *La tradukarto*.

**Marde la 7-an de septembro.**

Foriro de André Cherpillod.

**Aliĝoj** rete ([esperanto@citycable.ch](mailto:esperanto@citycable.ch))  
aŭ telefone 076 411 14 55 kun François Randin.

## Venontaj kunvenoj

**Oktobre 4 :** Programo decidota.

**Novembre 1 :** Programo decidota.

**Decembre 12 :** Zamenhofa Festo.

## Propagando en la bazono

Esperanto-propagando okazos en la laŭzana bazono la sekvajn sabatojn inter la 9a kaj la 12a horoj : 4an kaj 18an de septembro, 9an kaj 30an de oktobro.

-oOo-

# Luzern

## Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke.

Tel. 041 280 46 12.

### Kunvenejoj

**Gasthaus Adler**, Gerliswilstrasse 78, 6020 Emmenbrücke. Tel. 041 281 18 38.

Gastejo **Filali**, Luzernerstrasse 6, 6020 Kriens. (Buso 1, direkto Kriens-Obernau, haltejo Linde/Pilatus) 041 320 60 86 aŭ 079 658 40 67. [renata.filali@bluewin.ch](mailto:renata.filali@bluewin.ch)

Ĉe gesinjoroj Anna & Koni Rey, Heimatweg 4, 6003 Luzern. 041 210 25 88.

## Venontaj kunvenoj

**Septembre 1 :** Ĉe Filali 14h00-16h00 : Konversacia rondo kun Sonja Brun.

**Oktobre 6 :** Ĉe Rey 14h00 : Paroliga leciono kun Paul Scherer, 14h30 : Vivo de Sophie Taeuber-Arp kun Sonja Brun.

**Novembre 3 :** Ĉe Filali 14h00-16h00 : Konversacia rondo kun Sonja Brun.

**Decembre 1 :** Ĉe Rey 14h00 : Zamenhofologio kaj programo 2011 kun Paul Scherer.

**2011 Januare 5 :** Ĉe Filali 14h00-16h00 : Konversacia rondo kun Sonja Brun.

Gastoj ĉiam bonvenas, sed pro eblaj subitaj ŝanĝoj konsilindas telefone aŭ rete certiĝi, ĉu la aranĝo disvolviĝos kiel anoncote.

-oOo-

## La Tour-de-Peilz

### Svisa Muzeo de la Ludoj

Kontaktabloj kun Cesco Reale:

Telefono: 041-76-234 18 43

rete: [cescoreale@gmail.com](mailto:cescoreale@gmail.com)

La programo estas anoncita sub :

[http://www.doodle.com/chucrf2cvnz\\_aatbh](http://www.doodle.com/chucrf2cvnz_aatbh)

La Muzeo de la Ludoj atingebblas per 5-10 minuta promenado el la stacidomo de la urbeto La Tour-de-Peilz apud Vevey. En tiu mezepoka kastelo estas konservataj ĉarmegaj ekzempleroj de ludoj antikvaj kaj modernaj el diversaj landoj (Hindujo, Afriko, Ĉinujo, ktp).



Lude kaj samideane Cesco Reale  
<http://www.museedujeu.com/>

## Unua vizito kun gvidado en esperanto 6a de junio 2010



En niaj klopodoj informadaj kaj disvastigaj pri Esperanto tutcerte multon helpas, se la internacia lingvo akceptiĝas kaj uzatas en pli kaj pli da diversaj servoj kaj aktivecoj neesperantistaj. Tial ni povas gratuli *Cescon Reale* (sur la supra bildo) por lia atingiĝo: aldono de Esperanto kiel la oka elektebla lingvo disponebla por vizitgvidado ĉe la Svisa Muzeo de Ludoj, apud la angla, franca, germana, hispana, itala, portugala, rusa.



La svisa esperantistaro respondis tre favore al la oferto disvastigita de Cesco en la reto kaj tra *SES informas*. Tiom da vizitemuloj ariĝis en la muzeo por la unua esperant-

lingva vizito komence de junio, ke li devis formi du grupojn.

Jam alvenis ankaŭ rezervado por la grupo La Stelo de Ĝenevo.

Dum la vizito gvidita de Cesco, ni konatiĝis kun plej diversaj ludoj kaj ludiloj el la mondo, kreitaj tra la pasintaj jarcentoj, jarmiloj eĉ. Je la fino ni povis ekprovi plurajn el tiuj ludoj.



Raportis kaj fotis Stefano Keller

-oOo-

## Wil

**Esperanto-Klubo Wil (Orientisvislando)**

[www.esperanto.ch/wil](http://www.esperanto.ch/wil)

Kunprezidantoj: Verena Chaves-Walder, Rosenhügelstr. 22, 9230 Flawil. Tel. : 071 393 41 49. [chaves-walder@bluewin.ch](mailto:chaves-walder@bluewin.ch) kaj Wolfram Fischer Steigstrasse 12, 9116 Wolfertswil. Tel. : (P) 071 390 04 48 (O) 071 390 04 44. Fax : 071 390 04 47.

Kunvenoj : La esperantistoj kunvenas ĉiun unuan merkredon en la monato vespere de la 19-21 h. en la b'treff en Flawil situanta en la iama stacidomo.

## Venontaj kunvenoj

**Septembre 1** : Lumbildprelego de Barbara Pochanke : Esperanta vojaĝo al Mongolio. Ekkunvene rakonta rondo.

**Oktobre 14-17** : Partopreno al la Svisa Feria Esperanta Renkontiĝo en Métabief (en Francio norde de Vallorbe).

**Novembre 3** : Raporto de Verena kaj Gabriel Chaves pri la Universala Kongreso en Kubo. Ekkunvene : rakonta rondo.

**Decembre 1** : Rakledvespero kun poemoj, rakontoj kaj kantoj.

-oOo-

## Zürich

### Esperanto-Societo Zürich

Archstrasse 2, 8610 Uster.

Poŝfako 858, 8034 Zürich.

Tel. 044 251 50 25 (dum officejaj horoj)

Poŝtkonto: 80-17287-1

<http://esperanto.ch/zuriko>.

**La kunvenoj okazas en  
Centro "Karl des Grosse,  
Kirchgasse 14, 8001 Zürich.**

### Renkontiĝoj regulaj

ĉiam la lastan ĵaŭdon de la monato en la hejmo de Michael Roesser, Weinbergstr. 137, 8006 Zuriko je la 20h30 (rekte apud la haltejo "Rössli-strasse" de la tramoj 7 kaj 15 je 10 minutoj de la ĉefa stacidomo).

**Informoj pri la aktuala programo  
de Esperanto-Societo Zuriko  
troviĝas en la reto sub:**

[www.esperanto.ch/zuriko/programo.ht](http://www.esperanto.ch/zuriko/programo.ht)

[zuriko@esperanto.ch](mailto:zuriko@esperanto.ch)

<http://esperanto.ch/zuriko>

-oOo-


## Nove aperis

*Kurso agrikultura.* Rudolf Steiner. Serio de ok prelegoj prezentitaj de la aŭtoro en Koberwitz de la 7a ĝis la 16a de junio 1924. Eld. W. Nüesch, Berno 2009, 206 paĝoj.

*El la germana poezio.* Elektitaj tekstoj. Antologio de germana poezio de la 17a ĝis la 20a jarcento. Preskaŭ 30 poetoj. Eld. W. Nüesch, Berno 2010, 138 paĝoj.

*Anĝelmonto.* Conrad Ferdinand Meyer. Poemo rimita, idilia-tragika rakonto el la montaro (Engelberg, Titlis) kun historiaj aludoj. Eld. W. Nüesch, Berno 2010, 74 paĝoj.

La tri librojn tradukis kaj eldonis Willy Nüesch kaj ili estas aĉeteblaj rekte ĉe li, Brückfeldstrasse 11, CH-3012 Berno, aŭ ĉe la Libroservo de UEA kaj la libroservo de CDELI.



# Kongresen

## Kiel la britoj jarkunvenas

La brita tutlanda kongreso okazis 14-17 majo 2010 en Llandudno, en norda Kimrio ĉe la maro. (Llandudno estas la reala nomo. Kimrio = Wales.)

La urbeto estas arkitektura juvelo pro la elegantaj hotelfasadoj ĉe la larĝa strando. Dum la 19-a jarcento princoj kaj nobeloj venis tien por bani. La gloro kaj brilo iom velkiĝis, sed la natura beleco konserviĝis. Varbilo en Esperanto invitas viziti la „Reĝinon de Norda Kimrio“.

La unua lingvo en Kimrio estas la kimra, la dua la angla. La kongresaj bondeziroj de la reĝina moŝto Elizabeth II estas verkitaj en ambaŭ lingvoj. Kimraj vortoj ŝajnas al ni longaj, malfacile elparoleblaj. En marto ĉijare aperis la unua esperanta lernolibro en la kimra, cent jarojn post la unua esperanta ŝlosilo.

Nobleco daŭre gravas. La brita asocio kongresis en la luksa hotelo Imperial, laŭdire ankaŭ por impresi bone. Brita kongreso estas festivalo, skribis Hilary Chapman en la programo. Bankedo ĉe rondaj tabloj markis la unuan vesperon, kie granda virvoĉa koruso surprizis la gastojn per kantoj. Multaj el la 60 partoprenantoj dormis en pli

favorprezaj hoteloj aŭ en B&B domoj, kiuj estas same komfortaj.

La jarkunveno komenciĝis per kanto de la himno kaj disvolviĝis en la angla lingvo. Prof. John Wells suverene prezidis la kunvenon kun la kutima afableco. La protokolo estas prezentita nur en resuma formo. La kontrolo kaj raporto pri la financoj estas faritaj de ekstera instanco, ĉar la leĝo postulas sendependecon. La elektoj de la estraro eblas ankaŭ antaŭe perpoŝte por tiuj, kiuj ne povas partopreni. Okazis viglaj debatoj kaj diskutoj. Je la fino la organiza teamo transdonis flageton al la organizontoj de la kongreso 2011 en Eastbourne. Formoj estas respektindaj.

La kulturaj prelegoj tre interesis. Anna Löwenstein parolis pri la keltoj kaj Nerono kvazaŭ ŝi vivintus en tiu periodo. John Wells rakontis kiel li reverkis pedante la novan vortaron English-Esperanto-English kaj trovis novan eldoniston Mondial, ĉar la ĝisnuna ne plu estis interesita kaj rezignis pri la rajtoj. Mi maltrafis la prelegon de Hju Rid pri la „Strategio de Instinktoj“, sed legis de li interesan artikolon „*Esperanto, ĉu parazito?*“ en la kultura revuo LBE

(*La brita esperantisto*), aŭtuno 2009, prezentita dum la lastjara kongreso. Cetere ekzistas alia informilo kun aktualaĵoj sub la nomo „*Update*“, redaktita ĉefe en la angla.

La brita asocio havas domon kaj sidejon en Stoke-on-Trent, kie estas organizataj pluraj aranĝoj. La asocio vendis la domon en Londono, ĉar ĝi kostis tro multe pro riparoj. El la gajno estas pagitaj projektoj kaj laborfortoj, ekzemple Springboard. Temas pri strategio, instrui en lernejoj unue Esperanton kiel fremdan lingvon por profiti de la propedeŭtika efekto. Angela Tellier estas projekttestro kaj montris filmon pri la klaslaboroj. En 2008 oni mire akiris financan kontribuon de EU. Nun kunlaboras tri lernejoj : nome el Kembrigho, Miskolc (Hungario) kaj Herzberg am Harz (Germanio). Ili havas komunan lern-planon kaj interŝanĝas lernantojn. Estas atendenda projekto, sed la publiko ne sufiĉe rimarkas la rezultojn.

Kvin diskutrondoj celis paroligi la homojn. Estas proponitaj aktualaj temoj, informaj folioj enkondukas. La respondeculo nur stimulas, tiel ke la diskutantoj sentas sin tute liberaj. Ŝajnas al mi tre efika metodo, kiu ne kostas multe. Sub la okuloj de David Kelso ni diskutis ekzemple pri demokratio.

La lasta tago estas rezervita por ekskurso. 20 personoj veturis per buso ĉirkaŭ la monton Snowdon, laŭlonge de la maro kaj tra valojn. Hilary Chapman ĉiĉeronis sprite. La kamparo havas liberajn formojn kaj multajn arbetojn. Mi memoris pri la muzikkanto „*Verdas kaj verdas tiom...*“ de prof. Higgins. Flave kontrastis arbusto-floroj, nomataj Gorse, paradiza pejzaĝo. Ĉie staras fortaj kasteloj, sed ne restis tempo por viziti unu. Neniam pluvis, tamen mi ĉiam kunportis la pluvombreton. Nek la pluvo nek la vulkanaj nuboj malhelpis min, vere benitaj tagoj.

Bruno Graf

-oOo-

## Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo

Depost 2006 Herzberg am Harz, urbeto de 14'000 enloĝantoj en Niedersachsen (Germanio), portas laŭ decido de la urbokonsilantaro la oficialan kromnomon „La Esperanto-urbo“. Tio estas unika en la mondo. La aŭtoritato deklaris Esperanton kiel urban specialaĵon. La urbestro, Gerhard Walter, kaj kunlaborantoj lernas Esperanton kaj en la urbo funkcias Esperanto-centro.

Jam en la 1950aj jaroj la mezlerneja instruisto Pitzner instruis Esperanton en la urbodomo, ekde 1960 la stacidomestro Giessner aktivis longe kaj sukcese por Esperanto . Li estis prezidanto de la germanaj kaj internaciaj esperantofervojistoj, tradukis centojn da kantoj al Esperanto. La regiona Esperanto-societo Südharz dum jardekoj organizis kursojn kaj gastigis homojn. Eble la tereno estis

iomete preparita por sensacia publika elpaŝo.

Tamen la urbokonsilantaro verŝajne ne voĉdonis por Esperanto pro pura idealismo, sed ekkonis ekonomiajn kaj kulturajn avantaĝojn. En la ĉefstrato de Herzberg oni rimarkas plurajn fermitajn lokalojn vendotajn aŭ luotajn. Junaj homoj trovas pli bonajn laborkondiĉojn en urboj, dum enmigrintoj el Balkano vidiĝas ne malofte. La regiono estas turisme tre alloga pro la belega monteca arbaro Harz kaj la natura kuracado. Dum mia restado flavis vastaj grenkampoj.

La Esperanto-centro, nun Interkultura Centro Herzberg (ICH), troviĝas en bela privata domo kaj estas gvidata de Peter Zilvar kaj Zsafia Korody. Kiel filio por klerigado kaj kulturo de la Germana Esperanto-Asocio ĝi organizas kursojn, ekzamenojn, seminariojn, kongresojn kaj trejnas instruistojn. En Herzberg okazis 2009 komuna kongreso de la germana kaj eŭropa Esperanto-asocioj kun 400 gastoj. En julio ĉijare la OSIEK-konferenco, al kiu mi partoprenis, kunvenis kaj traktis la temon Esperanto, la revolucia aŭ pli bone revoluciiga lingvo.

La urbestro kaj la interkultura centro intensive kunlaboras por plukonstrui la Esperanto-urbon. Helpas volontuloj, eĉ konata, ĉar mi renkontis tie Giancarlo Fighiera, iama organizanto de Universalaj Kongresoj. Momente estiĝas fondaĵo por financi interkulturajn projektojn. Okulfrapaj estas la informtabuloj germane-esperante. Ekzemple en la

stacidomo salutas tabulo „*Bonvenon en Herzberg*“. En la tuta urbo informindikoj estas en la germana kaj resume en Esperanto. Tio ĝojigas esperantistan koron kaj oni sentas simpatian flankon de la urbanoj. Kiam mi sidis en kafejo, apude fremda knabo diris neatendite: „*Ankaŭ mi parolas Esperanton.*“

Kelkaj gastejoj havas esperantan menukarton kaj ofertas Esperanto-Döner aŭ kvinpintan picon.

Aparte menciindaj estas la interkulturaj kontaktoj inter Herzberg kaj la pola ĝemelurbo Gora, kie Esperanto funkcias kiel pontolingvo. En lernejoj de ambaŭ urboj oni instruas Esperanton por faciligi reciprokajn rilatojn. Jam tradiciaj estas la kontaktoj inter la urbestroj kaj la interŝanĝoj de lernantoj. Herzberg ankaŭ partoprenis en Comenius-projekto kun Springbordlernejo en Britio kaj partnerlernejo en Hungario, same en Erasmus-projekto ebligante staĝadon de studentoj.

En Esperanto-urbo ne povas manki Zamenhof-monumento. Okaze de la 150a naskiĝtago, la 15an de decembro 2009, estis solene inaŭgurita busto sur soklo en nigra kaj blanka marmoro honore al la iniciatoro de Esperanto. Estas klasika artaĵo farita de ĉinaj skulptistoj.

Kaj nun: iru al Herzberg, kiam ICH organizos interesan kunvenon, Konsultu la kalendaron ĉe la retejo : [www.esperanto-zentrum@web.de](mailto:www.esperanto-zentrum@web.de)

Bruno Graf.

## Du esperanto-kongresoj en Kubo : la universala (UK, 17-24 julio 2010) kaj la junulara (IJK, 24-31 julio 2010)



Amikoj el Aŭstralio (Richard), Brazilo (Alvaro) kaj Svislando (Luko) portantaj la T-ĉemizon de la lasta Junulara Esperantista Kongreso en Ĉeĥio troviĝas en Kubo.

Vendrede mi flugas de Ĝenevo al Parizo kaj de tie al Havano. Mi iom timis esti sola kaj enui en aviadilo dum preskaŭ dek horoj, do mi kunportis diversajn okupilojn: librojn, elektonikan ŝakludon..., sed finfine ili preskaŭ ne eliras la dorso-sakon.

Efektive mia vojaĝo ne restas longe soleca: Jam en la pariza flughaveno kolektiĝas kelkaj vojaĝantaj esperantistoj. Paŝante en iu kafejo mi ek-aŭdas la ŝatatan lingvon. Babilas tie internacia grupeto konsistanta inter-

alie el la samlandano Dieter Rooke, kaj el la prezidanto de UEA Probal Dasgupta vojaĝanta el Barato (Hinda Unio). Poste en la vico al la aviadilo mi havas la honoron babili persone kun nia prezidanto, kiu aperas kiel tre simpatia kaj humurhava homo. Dum la flugo mi iom promenas laŭ la koridoroj kaj ŝajnas al mi, ke troviĝas ĉirkaŭ 15-18 esperantistoj en la sama veturilo super la atlantika oceano.

Tra la fenestretoj nur akvo videblas sub ni, unufoje ŝipo, de tempo al tempo nebuloj. Ĝis finfine ĉirkaŭ la 23a horo laŭ eŭropa horo, la 17a laŭ loka horo, aperas tero. Kaj denove akvo, kaj nova insulo, kaj ni komencas malaltiĝi. Jen Kubo kun sia ekzotika pejzaĝo, siaj palm-arboj !

Atendante buson aŭ taksion al la hoteloj (UEA kun loka komitato organizis ĉiujn transportojn) mi konatiĝas kun Osmo Buller (la direktoro de UEA), kiu bonsurprizas min dirante, ke li min konas per miaj artikoloj en la bulteno *SES informas*. Dum tiu tempo kubana organizanto zorgas trovi por ni plian veturilon.

La morgaŭon malfermiĝos la *Palacio de Convenciones de la Habana* kiel kongresejo. Tio estos revido kun amikoj el la tuta mondo kaj konatiĝo kun aliaj.

Dimanĉe okazas la solena malfermo de la 95a Universala Kongreso de Esperanto. La kongresa temo estas « *Interproksimigo de kulturoj* ». Partoprenas 1002 homoj el 59 landoj. Eĉ 8 el ili heroe venis el Usono, kvankam tiu ŝtato malpermesas al siaj civitanoj vojaĝi al Kubo !

Łukasz Żebrowski, la vicprezidanto de TEJO (Tutmonda Esperanto Junularo) rimarkigas, ke ne estas kutimo, ke ambaŭ kongresoj (UK kaj IJK) okazas en la sama lando. Tial despli gravas honoro por Kubo. Fakte estas ankaŭ granda ŝanco por la kubanoj mem, ke tiuj gravaj aranĝoj okazas ĉi-tie, ĉar plej multaj el ili tute ne havas eblon vojaĝi. Do tiel ili havas unikan okazon sperti

tiujn mondskalajn renkontiĝojn de esperantistoj. Cetere multaj loĝantoj de Kubo, kiuj lastjare tute ne estis esperantistoj, lernis nian lingvon dum la lastaj monatoj, kiam ili eksciis okazigon de tiuj kongresoj en la propra lando, por kapti okazon renkonti kaj paroli kun homoj el la tuta mondo.

Kadre de la landaj salutoj José Antonio Vergara proponas devizon de kuba filozofo José Marti, « *patria es humanidad* », tio estas « *patrolando estas homaro* ». Bele, ĉu ne ! Kiam inter Svedio kaj Ukrainio mia salut-vico alvenas, mi diras tiujn vortojn : « *Karaj, kelkfoje ja indas resti dek horojn en aviadilo super marego, super nebuletoj. Despli kiam jam dum la vojaĝo oni renkontas aliajn esperantistojn. Mi salutas vin nome de iu plurlingva landeto meze de Eŭropo. Bonan kongreson !* »



La urbo Havano plaĉas al mi kun siaj mirindaj arboj borde kaj meze de la stratoj.

La semajno bone viviĝas. Oni kantas en koruso, oni spektas koncertojn kubajn aŭ internaciajn, oni lernas la hispanan lingvon kaj kubajn dancojn aŭ Esperanton en kursoj de Katalin Kováts aŭ de ŝia edzo, oni aŭskultas prelegojn pri Kubo (pri muziko, geografio, politiko...), oni trapasas ekzamenojn, oni ĉeestas diversajn konferencojn aŭ rondojn (ekzemple pri katoj), oni satiĝas en la bankedo aŭ malsatas malantaŭ la pordo de ĉi-lasto, oni dancas en la balo, ... kaj ĉefe oni havas bonan tempon kun samideanoj. Mi eĉ sufiĉe rapide enamiĝas kun iu ĉarma germanino, kies nomon mi ne diras ĉi-tie.

Iun vesperon post la kongresa programo ni duope iras en la urbon vidi marbestĝardenon kaj spektaklon de delfenoj. Ili imponas nin saltante plurajn metrojn super akvo aŭ marŝante sur akvo per sia vosto. Poste ni romantike promenas preter la marbordo rigardante la stelojn kaj aŭdante la marŝaŭmon...

Sabate la 24an jam finiĝas la UK, sed por ĉirkaŭ 200 el ni komenciĝas alia parto de la kuba kaj esperanta restado : la IJK, per buso je unu horo for de Havano.



Ni alvenas en ian surteran paradizon, en kiu ni pasigos belegajn feriojn nomatajn « kongreso ». FERIA centro kun hotelo konsistanta el multaj dometoj, simpla lokstila teatro kie okazos la kongresaj programeroj, naĝejo kun trinkejo (aŭ « drinkejo »), kie ĉiuj trinkaĵoj estas senkostaj dum la tuta tago kaj tuta semajno por la loĝantoj de la hotelo, kaj plaĝo kun bela kaj varma maro.



En la tutproksimeco troviĝas montoj kovritaj de arbaro, kies neniun arbon mi konis. Belege !



Rilate al la lasta jaro la kongresa programo estas ege malriĉa, (nur programeroj vice kaj eĉ ne ĉiam io) sed tio tute ne gravas, ĉar la loko mem larĝe kompensas.

Kiam ni leviĝas matene, mia koramikino kaj mi ĉiam komencas la tagon irante naĝi en la maro. Poste ni



matenmanĝas, ofte kun Marek, Johannes kaj aliaj geamikoj. Matene ni kelkfoje ĉeestas prelegon en la teatro aŭ trovas alian aktivecon.

Iun tagon ni ĉirkaŭ 20-ope migras en arbaro, programero, kiu nomiĝas

«montgrimpado». Ni renkontas kelkajn interesajn arbojn kiel ekzemple la tiel nomataj «geamantoj», kaj multajn helikokonkojn loĝatajn de marbestetoj : ermitokraboj.



Dum la vizito al arboj nomataj geamantoj

Alveninte sur la montosupro ni iras ĝis iu loko, el kie oni bele vidas nian plaĝon kaj pejzaĝon. Nia ĉiĉerono poste gvidas nin ĝis la dometo de liaj gepatroj, kiuj kultivas kandosukeron,

bananujojn, kokosnuksojn, mangojn kaj aliajn fruktojn. Ili estas vere bonvenigemaj kaj donacas al ni fruktojn por gustumi.

La antaŭlastajn tagojn ni kelkope prunteprenas pedalboateton kaj markulvitrojn kun spirtuboj kaj iras tiel spekti mirindan subakvan pejzaĝon de koraloj kaj fiŝoj. Por la unua fojo de mia vivo mi ĝuas tion, naĝas kun

fiŝoj. Estas ankaŭ agrable tiel havi la vizaĝon sub la akvo kaj ne senti sian pezon, promeni tiel malrapide super vivantaj bestaj kaj mirindaĵoj tute proksime de ili.



Kampano ĉe siaj bananujoj



IJK-ĝuantoj. De maldekstre la tria kun ĉapelo estas Luko.

Nu, nun mi estas reveninta hejmen, retrovis konatan pejzaĝon, familion, najbarojn, kunlaborantojn... sed bildoj de tiuj du semajnoj en Kubo en esperantujo kun bonegaj geamikoj restos ĉiam en mia memoro.

Luko Allemand.

Redaktas: Richard Schneller (rs), Höhenstrasse 1 b, CH-9300 Wittenbach, rischneller(ĉe)gmail.com. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

## De Borovko al Michaux

• Bernhard Pabst\*

Rakonteti pri la nova Zamenhof-biografio *Homarano* (2009) de Aleksander Korĵenkov estas tre agrabla faro. Ĝi simple estas preskaŭ ĉiuaspekte bona kaj leginda libro kaj – mi aŭdacas la prognozon – nova klasikaĵo.

### HOMARANO

La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L.L. Zamenhof



Aleksander Korĵenkov

Serio Scio, Volumo 8


Korĵenkov, *Homarano (Zamenhof)*, 2009.

Kiel oni povas skribi ankoraŭ ion novan kaj nepre legindan pri Zamenhof post la biografioj de Privat, Drezen, Boulton, Ziólkowska, Itô Kanzi, Krasko, Wisniewski, Centassi kaj Masson, post la esploroj de Holzhaus, Maimon, Waringhien, post la *Plena Verkaro de Zamenhof* (PVZ) kaj la klasika *Originala Verkaro* (OV) de Dietterle, post multegaj enciklopediaj artikoloj kaj studoj pri unuopaj aspektoj en periodaĵoj kaj festlibroj (EBEA sole listigas pli ol 300)? Korĵenkov scias.

Unue, lia *Homarano* estas facile legebla kaj stile eleganta. Ĝi bone tenas la balancon inter faka ĝusteco kaj popular-sciencia kompreneblo. Ĝi estas atento-kapta kaj -tena kiel romano kaj ne fortimigas per (ŝajn-)sciencia lingvaĵo volapukeca. Aliflanke ĝi ne drovas en obskura fabel-flako hagiografia kiel Boulton, Banet-Fornalowa aŭ Centassi/Masson. Korĵenkov scias skribi.

Due, ĝi estas tre lerte strukturita kaj interplektita, baze kronologie laŭ la vivo de Zamenhof, parte laŭ temoj (jen profesia kaj familia

vivo dum iuj jaroj, jen esperanta agado dum la sama periodo). Per tiu apudmeto ekestas nova fona kaj pli profunda kompreno de faktoj jam longe kaj bone konataj,




Marjorie Boulton, Zamenhof, 1962

Trie ĝi abunde citas el leteroj de Zamenhof mem kaj el fontoj de samtempuloj. Li lasas paroli la « Majstron » mem. Tiel ekestas tre intima, rekta, senpera, viva rigardo al la protagonisto. Korĵenkov traktas sian heroon kun simpatio, tamen kun la necesa sobra distanco. Liaj klarigoj komprenigas la cirkonstancojn de historiaj eldiraĵoj kaj bone gvidas la leganton. Korĵenkov scias konvinki.

Kvare la biografio estas konciza, preskaŭ lakona malgraŭ sia ĉ. 320 paĝoj en formato A5. Ni ne tediĝas pro regurdado de aferoj jam x-foje legitaj. Korĵenkov scias « trafi la punkton ».

Kvine la libro prezentas ne jam konatajn faktojn kaj detalojn surbaze de propraj esploroj en arki-

tiel ke ili aperas en nova perspektivo – ne malgranda atingo, se oni konsideras la amasegon da ekzistanta materialo. Korĵenkov scias strukturi.



Henk Thien, Zamenhof en bildoj

voj, ekzemple pri la jaroj en Grodno. Korĵenkov scias science labori.

Sese la juĝoj pri disputataj punktoj preskaŭ senescepte estas kleraj, saĝaj kaj ĝustaj, almenaŭ bone bazitaj kaj akcepteblaj aŭ defendeblaj. Korĵenkov scias juĝi. Sepe, centre – kaj provizore laste – *Homarano* ŝanĝas nian « klasikan » bildon pri Zamenhof surbaze de la « letero al Borovko » [1], al la pli realisma, pli persona kaj pli « vera » bildo surbaze de la « letero al Michaux » [2]. Estas pro tio, ke mi aŭdacas la prognozon, ke ni ĝuste ĉeestas la naskon de nova « klasika » verko, simile destinita al larĝa publiko kiel la klasika biografio de Privat. Korĵenkov disigos zamenhofologion

en « antaŭ-Homarana », « Privata » aŭ « romantika » kaj « post-Homarana » epoko. Sendube la verko estos kritikata, kompletigata, eble reviziata pri detaloj, ekzemple pri la « doktoreco » de Zamenhof [3]. La kerna mesaĝo « de Borovko al Michaux » – plurloke preparita inter fakuloj, sed neniam tiel klare prezentita al « simplaj » interesatoj – tamen restos la bazo de ĉiuj estontaj diskutoj dum longa tempo.

Se vi ne volas aŭ povas legi dekduon da Zamenhof-biografioj, legu tiun ĉi.

### Piednotoj

[1] Letero al Borovko (kromnomata ankaŭ Letero pri la deveno de Esperanto) estas letero verkita en la rusa lingvo, kiun Ludoviko Zamenhof adresis en la jaro 1895 al Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko, pioniro de la esperanto-movado en tiama Rusio. Ĝia parto, en kiu Zamenhof respondas al Borovko donante klarigojn pri la cirkonstancoj de ekesto de la internacia lingvo Esperanto, estas la plej fama rakonto pri la deveno de Esperanto kaj kiel tia ofte citata de esperantistoj kaj uzata dum informado pri la lingvo. Esperantlingva traduko de la koncerna parto de tiu letero aperis en *Lingvo Internacia* n-ro 6-7, paĝoj 115-119. Kiel aŭtoro de la traduko estas indikita Vladimir Gernet, sed la tekston certe reviziis Zamenhof mem (laŭ Vikipedio).

[2] La letero de L. L. Zamenhof al Alfred Michaux (21.11.1905) troviĝas kiel prologo en la libro *Homarano de Aleksander Korĵenkov* kaj pravigas la librotitolon, ĉar ĝi klarigas la idean vojon de Zamenhof de cionismo al homaranismo kaj la malfacilojn de lia

nacia identeco kiel « ruslanda hebreo ». Zamenhof ankaŭ rakontas sian baraktadon profesian por certigi la materian vivon de sia familio. – Alfred Michaux, franca advokato, estis la iniciatinto de la unua kongreso en Bulonjo-ĉe-Marco en 1905 (ndlr).

[3] Zamenhof ne havis akademian gradon de doktoro de medicino. « Doktoro » simple estas sinonimo de « kuracisto ».

\* Bernhard Pabst (naskiĝis 1960) estas germana juristo kaj Esperantologo. Li verkis *Inversa Vortaro de Esperanto* (IVE, 1989), kunlaboris ĉe *Perkomputora Termino-Kolekto* (Pekoteko) de Rüdiger Eichholz, *Elektronika Bibliografio de Esperantaj Artikoloj* (EBEA), *Manlibro de Politiko* (ed. Stefan Maul). Kontribuis per multaj artikoloj i. a. al la periodaĵoj *Monato*, *Internacia Jura Revuo*, *Akademaj Studoj*, *Kontakto*, *Esperanto aktuell* k. a. Redaktis la fakrevueton *Terminoteko, informilo pri Esperanta termino-farado*. Kelkaj studoj pri konataj Esperantistoj: Butin, Hankel, Witterjik, Pennedorf k. a. (laŭ Vikipedio).



*Pollingva Zamenhof-biografio el la Zamenhof-jaro 1959 (centa naskiĝtago).*

## Alloga Beletra Almanako 7

• *Stanislavo Belov*

Kutime mi komencas foliumi ekde la recenzoj, kiuj tradicie abundas en ĉi tiu periodaĵo. Danke al ili mi ekscias pri libroj (kaj ne nur novaj), kio estas tre grava por tia librovermulo kiel mi. En situacio, kiam forestas alireblaj vendejoj kun esperanto-libroj, en kiuj oni povus trarigardi ilin kaj ricevi propran opinion, recenzoj havas nesubtakseblan signifon.

### *Revaz*

Tamen ĉi-foje mi ekis mian konatiĝon kun « BA » ekde la sekcio « la tradukita prozo », konkrete – ekde la rakonto *Revaz*, tradukita el la rusa de mia samlandano Slavik Ivanov. Temas pri oseta junulo Revaz, kiu konsideras virinon kiel patrino kaj edzino, sed ne memstara, memsignifa figuro. Ĉio okazas en mia tempo kaj en mia lando, do mi ne miras, ke, laŭ la rimarko de la tradukinto, tiu rakonto havis grandan sukceson kaj resonon inter la legantoj.

Mi sufiĉe malofte legas la nuntempan rusian literaturon kaj fikciaĵojn entute, sed ĉi tiu verko efektive impresis min. La aŭtoro, kaŝinta sin sub la kaŝnomo Ĝoni Rahmonov, vere bone scias sian metion. Li (ŝi?) aranĝis fortikan miksaĵon de tiaj komponantoj kiel masklismo, strebo al potenco kaj emo al perforto, ke restas nur miri – ĉu antaŭ ni staras diplomiita freŭd-isto? En la rakonto estas brile montrata kiel la ĉefa heroo moviĝas

ekde tipa kaŭkaza vireco kun ĝia malestimo al seksaj malplimultoj, al ĉiuj stranguloj entute kaj fine aliras strikte al... vera faŝismo. Ni vidas lin fosinta en tolaĵoj de sia fratino (fajna alludo al incesto), kiun li batas kaj eĉ ricevas de tio ĝuon (sekso kaj perforto kunfandiĝas en lia konscio) kaj poste ni ne tre miras, vidante lin admiranta Hitleron (almenaŭ parte) kaj batanta ĉiesulinon en banejo.

Iuj el legantoj diris, ke la aŭtoro troigis la nuntempan bildon. Sed mi pensas alie. Ĉiutage mi vidas similajn homojn en mia urbo kaj scias, ke tiu patriarĥa ideologio, bazanta sur subpremado de virina kaj infana seksecoj, estas sufiĉe disvastigita inter rusianoj. Kaŭkazanoj kun ilia pli malalta eduknivelo kaj pli fortika patriarĥa tradicio, estas aparte influataj de tiu tendenco. Ĉiutage mia edzino vidas en la universitato (kie ŝi instruas la anglan) gregojn da kaŭkazaj junuloj, kiuj tuttage staras ĉe la enirejo kaj laŭte babilas, muzikumas per poŝtelefonoj kaj palpas per rigardoj (ne ĉiam nur) preterpasantaj junulinojn anstataŭ almenaŭ iom lerni.

Mi diru pli – iam ni bone konis la filinon de plej riĉa armeno de nia urbo, kiu estras la armenan komunumon de Tjumen. Dum kelkaj monatoj ŝi lernis la anglan ĉe mia edzino kaj ofte vizitadis nian hejmon. La malfeliĉa junulino (ĉirkaŭ 19 jaroj) neniam promenis laŭ stratoj – ĉu sole, ĉu kun siaj amik(in)oj. Frato de la patro veturigis ŝin de hejmo al la universitato, de tiu al nia

hejmo kaj poste al ŝia hejmo denove. Promeni ŝi rajtis nur akompanata de la patro, patrino aŭ aliaj plenkreskaj parencoj. Vendejoj, kinejoj, ĝardejoj, frizejoj – nur tiel !


Iom poste ŝi konatiĝis en la universitato kun alia studento – kutima junulo, brava, simpatia kaj vivoĝoja. Li respondis al ŝi reciproke (sed ne nur al ŝi) kaj ili komencis kaŝe renkontiĝi hejme ĉe ni. Nu, kiel mi diris al ili, ĉiu mistero en nia malgranda urbo estas nur portempa. Finfine ĉio estis malkovrita kaj Anna por ĉiam malaperis el nia vivo. Post kelkaj tagoj ni ricevis EMS-on (et-mesaĝsistemo, angle SMS), en kiu ŝi sciigis, ke ŝi estis grave batita de sia patro, sed restos obstina en sia amo. La plej granda obstaklo estis, ke ŝia amorato estis... kartvela greko – ne armeno. Kaj tio decidis ĉion. Pasis plua tempo kaj ni ekkonis de li mem, ke homoj de la patro diris al li, ke ili murdos ĉiujn familianojn de la junulo, se li iam denove renkontiĝos kun Anna. Li prudente cedis.

Poste mia edzino kelkfoje vidis Anna-n. Ŝi edziniĝis (kun armeno, certe) kaj direktiĝis al la medicina altlernejo (ŝi ĉiam malamis tiun profesion). Ŝi perdis la tutan sian brilon de la belega junulino kaj iĝis kutima kaŭkaza edzino kun nigra hararo kaj malĝoja, timema rigardo. Ŝajnas, ke baldaŭ ŝi naskos.

### *Sinjur' Nenio*

Jam en la 4-a (unua por mi) numero de «BA» mi rimarkis la interesan aŭtoron – norvegon Bjørn A. Bojesen – kiu publikigis sian fabelan rakonton *Korno kontraŭ krud'*. Tiu verketo impresis min pro la

majstra stilo kaj bunta lingvaĵo de la aŭtoro, kiu nemal multe torturis min – povran komencanton – per centoj da neologismoj, kvazaŭ strebante misterigi sian tekston kiom eble plej grave. La nuna rakonto estis iom pli facila (aŭ mi progresis, ĉu ?), sed la ĉefaj trajtoj de lia stilo restis samaj. La rakonton oni legas kun ĝojo kaj afableco, ĝi iom memorigas *La his-*




**Beletra Almanako**  
N-ro 7 (Februaro 2010) = 4a jaro  
ISSN 0919-9691/2010 / ISSN 1407-5025

---

Redaktas Jorge Camacho (Redakci), Petrus Elstegapita, István Irti

Redakci:  
Marta  
Malykova



---

Cirkumferencio:

Fono: Originalo: Bjørn A. Bojesen, Jorge Camacho, Franckita  
 (Lukiano (Carre) Borevling), Gerd Borenzore (Garda (Kano))  
 Fono: Narda Paggara  
 (Fotografado): Carre Borevling  
 Artikolado: Christian Dierckx, Antonio Vaino  
 (Redakci): Elin Loring, Carlo Marzola  
 (Redakci): Ricardo Felipe (Albert Bayon, Valentin Mikhajlov, Jorge  
 Camacho, Arsen (Lj) Miti Pevon, Connor Collins, Michael  
 Cayley, Petrus Elstegapita, Steve Johnson, Geoffrey Jackson,  
 Richard Hargreth)

---

KONDA
NOVIORKO
www.beletra.com

*torion de sinjoro Sommer* fare de Patrick Süskind. Sed finleginte ĝin oni kaptas sin je la penso, ke... oni nenion eksciis kaj esence eksentis, kvazaŭ eltrinkis afablan trinkaĵojn – ĝuigan, sed malnutran. Pripensante tion, mi ekskludis, ke verŝajne ĉi tiu 29-jaraĝa verkisto simple ne jam havas ion por diri al la mondo. Nu... li jam havas stilon kaj kiam li akiros pensojn, li povos eksponi ilin per bona ilo.

Oni povas diri plu kaj plu, sed por kio? Pli bone estus unu fojon tralegi, ol centfoje aŭdi...

# Analizo post la svisa referendumo pri minaretoj

*Laŭ la analizo VOX de la universitato de Berno, la balotintoj, kiuj akceptis la malpermeson por konstruo de minaretoj, volis simbole esprimi sian opozicion al la plivastiĝo de islamo en Svisio. La analizo same montras ke tiu sinteno ne signifas ĝeneralan malaprobbon de la islamanoj en Svisio.*

Por memoro : la popola iniciativo pri minaretoj estis surprize akceptita per 57,5% de la civitanoj la 29-an de novembro 2009. La maldekstro klare malaprobis la leĝproponon per 80%, la dekstro akceptis ĝin preskaŭ per sama procentaĵo. Apud la kontraŭa sinteno inter la dekstro kaj maldekstro estis ankaŭ decidaj la diversaj opinioj rilate valorojn kaj la sinteno de la politika centro.

La simpatiantoj de la SVP (Svisa Popolpartio) estis preskaŭ unuecaj en la aprobo de la leĝpropono, tiuj de la Verduloj kaj de la SP (Socialista Partio) masive rifuzis ĝin. La simpatiantoj de la FDP (Liberaldemokratoj per 60% da jesaj voĉoj) kaj de la CVP (Kristandemokratoj per 54% da jesaj voĉoj) decidiĝis kun plimulto kontraŭ la rekomendo de siaj propraj partioj.

## Motivoj de la voĉdonintoj

La verdikto de la popola voĉdono ne klarigeblas sole per ksenofobiaj motivoj aŭ la tutmondiĝo kaj el ĝi rezultanta perdo de identeco por

Svisio. Ankaŭ civitanoj, kiuj engaĝiĝas por la egaleco de ŝancoj por svisoj kaj same eksterlandanoj, respektive por malfermeco al la mondo de Svisio, jesis per 40%.

Koncerne la sociajn karakterizojn la instruiteco plej forte markis la balotan decidon. Personoj kun diplomo de metiisto akceptis per 76%, finstudintoj de alta faklernejo per 48% kaj tiuj de universitato per 34%.

Protestantaj same kiel katolikaj kristanoj aprobis la leĝproponon per 60%, personoj sen religio rifuzis ĝin.

Ne estis signifa diferenco inter la seksoj, sed maldekstraj virinoj ege kontraŭis, nur 16% el ili jesis; la viroj de tiu grupo per 21% aprobis. Por la dekstro la jesantoj estis 87% por la virinoj kaj 71% por la viroj.

Kiel la plej oftan motivon por malpermeso de minaretoj oni menciis la opozicion al la plivastiĝo de islamo en Svisio. La minareto estas ofte perceptata kiel signo de konkernanta islama potenco. Ĉiu sesa akceptanto deklaris ke lia decido estis reakcio kontraŭ la diskriminacio de kristanaj eklezioj en landoj karakterizitaj de islamo.

Konkretan kritikon pri islamanoj vivantaj en Svisio menciis nur 15%. 64% deklaris ke la svisa kaj la islamana vivmaniero povas bone kunekzisti. Tamen ĉi tiu pozitiva sinteno ne efikis por la voĉdono, ĉar 56% de tiu grupo akceptis la malpermeson konstrui minaretojn. (rs)



## La svisa ŝuldobremso kiel modelo

*La ŝuldokrizo en pluraj landoj de la eŭrozono – sekvo de la financa kaj ekonomia krizoj tutmondaj kaj de la depreco de la eŭro – instigis la Eŭropan Union prikonsideri la reguligon de ŝuldoj de la membro-ŝtatoj.*

Konata estas la Pakto pri stabileco kaj ekonomia kreskado de la Eŭropa Unio, per kiu la eŭrolandoj sin devigis principe je novŝuldiĝo de maksimume 3% de la malneta interna produkto kaj ŝuldovolumo je maksimume 60%. Oni scias ke la limigo de la novŝuldiĝo ne estis respektata dum la lastaj jaroj kaj fakte en multaj landoj duobliĝis aŭ eĉ triobliĝis kaj ankaŭ la limigo je 60% plej ofte ne estis plenumita.

Estas evidente ke en tempoj kiam la ekonomio prosperas, la ŝtato enspezas pli ol kiam la ekonomio malprosperas. La politikistoj tendencas elspezi kaj investi pli, kiam la enspezoj de la ŝtato estas altaj, sed kiam la ekonomio malprosperas, mankas mono por pagi la pli altajn kostojn de la socialaj asekuroj (i. a. senlaboreco) kaj la investojn por infrastrukturoj (i. a. publikaj konstrulaboroj, stratoj, fervojoj ktp.).

La ideo de ŝuldobremso estas ekvilibro de la elspezoj dum la cikloj de forta kaj malforta konjunkturoj. Praktike oni fiksas limigon en bonaj tempoj por ke oni havu rezervon por malpli bonaj tempoj. Kiam okazas neantaŭvideblaj eventoj kiel ekonomia krizo aŭ naturkatastrofo, la parlamento rajtas decidi preterpason de la fiksita limo de elspezoj.

En Svisio relative nova artikolo en la federacia konstitucio, tiel nomata « ŝuldobremso », estis enkondukita post decido de la parlamento kaj konfirmo de popola voĉdono en 2001.


Laŭ tiu reguligo la ŝtato estas devigata ekvilibrigi enspezojn kaj elspezojn en la daŭro de konjunktura ciklo. La civitanoj komprenis, ke altaj ŝuldoj ankaŭ signifas altajn interezojn repagendajn. Malgraŭ iaj timoj komence, la plimulto fine fidis la parlamentanojn por ke ili ne ŝparu por socie nepraj elspezoj.

De la jaro 2003 ĉi tiu relative komplika mekanismo aplikiĝas kaj oni konstatis ke la ŝuldoj proksimume stabiligis kaj ke la ŝuldokvoto malaltiĝis. Tamen oni povos definitive juĝi pri la taŭgeco de la ŝuldobremso nur post kompleta ciklo de la konjunkturo. Ĉiukaze daŭra kresko de ŝuldoj kiel komence de la 1990aj jaroj, kiuj estis karakterizitaj de ekonomia stagnado, ne plu okazis en la lastaj jaroj. Kompreneble la parlamento ankaŭ estonte respondecas pri tio ke la ŝparado estu socie akceptebla.

Tiu reguliga sistemo estis ankaŭ modelo por similaj ŝuldobremsoj en kelkaj eŭropaj landoj. Ekzemple Germanio enkondukis similan konstitucian artikolon en la jaro 2009. Post la premo de la financaj merkatoj kaj tiu de Germanio, la franca registaro promesas similan ekvilibrigan reguligon por malaltigi la ŝuldojn de la ŝtato kaj stabiligi la elspezojn. (rs)

# Japanio : longa lernado de la paco

Ĉu montri la teruraĵojn de la milito povas progresigi la ideon de la paco ? La ekspozicio « La paradokso japana – longa lernado de la paco » (« Le paradoxe japonais – un long apprentissage de la paix ») estis retrorigardo pri la sekvoj de la atoma bombado de Hiroŝimo kaj Nagasako en 1945.



*Damaĝoj en la centro de Hiroŝimo*

La ekspozicion konceptis la Pac-museo de Hiroŝimo kaj dum ŝia restado en Japanio Mireille Grosjean serĉis, post sugesto de la responsuloj

de ĉi tiu ekspozicio, lokon por montri ĝin en Svislando. Diakro de la reformita eklezio de Neŭŝatelo, Elizabeth Reichen, estis interesita kaj trovis taŭgan lokon.

Ekde la usonaj provoj en la deserto de Nevado ĝis la rememoraĵoj en la Muzeo de la Paco en 1997, tridek afiŝoj rakontas la hororon de la atombomboj. La unuaj fotoj montras la urbojn kiel ili aspektis antaŭ la bombado kaj la sekvaj montras la haoson de ĉi tiu mallumaj tagoj. Mallumaj kiel la ombro sur la pavimo lasita de homo pulvorigita dum la eksplodo. La foto estas impresiga.

Demandaro akompanas la ekspozicion kiu estas destinita al la vizitantoj kaj kies rezultoj reiros al la muzeo en Hiroŝimo. Per demandoj kiel « Ĉu Japanio meritis la bombadon ? » la celo ne estas taksi la sciojn, sed instigi al vera pripensado de la demando. *(rs)*

*(Laŭ L'Express 15.6.2010.)*

---

## Kuracistoj

*(peris Ueli Hänni)*

Famkonata ĥirurgo, reveninte hejmen post laboro, sidis sur sofo kaj ekrigardis televidan novaĵelsendon, kiam sonoris telefono. La kuracisto trankvile respondis kaj aŭdis ĉe alia flanko voĉon konatan de kolego. –

« Ni bezonas kvaran personon por ludi je kartoĵoj », diris la amiko.

« Mi tuj venos », flustris la kuracisto.

Kiam li vestiĝis por foriri, lia edzino demandis : « Ĉu estas grava ? »

« Jes, sufiĉe grava », diris impresodone la kuracisto, « verdire ĉeestas surloke jam tri aliaj kuracistoj !





# Svisa kalendaro

## Aŭguste

- 21 : Genève : Somera Ekskurso.
- 26 : Basel : ESB-Kunveno
- 29 : Basel : ESB-Ekskurso.

## Septembre

- 1 : Luzern : LES-Kunveno.
- 1 : Wil : EKW-Kunveno.
- 3-6 : Lausanne : LES- Seminario A. Cherpillod.
- 15 : Bern : Renkonto ĉe Restoracio Esperanto.
- 12 : Basel : Migrado al *La Petite Camargue*.
- 25 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

## Oktobre

- 2 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Kultura seminario.
- 4 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 6 : Luzern : LES-Kunveno.
- 10 : **Redakta datlimo de *SES informas*.**
- 14-17 : Svisa Feria Esperanta Renkontiĝo en Métabief proksime de Vallorbe.
- 23 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
- 28 : Basel : ESB-Kunveno.

## Novembre

- 1 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 3 : Luzern : LES-Kunveno.

- 3 : Wil : EKW-Kunveno.
- 6 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Kultura seminario.
- 20 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
- 25 : Basel : ESB-Kunveno.

## Decembre

- 1 : Luzern : LES-Kunveno.
- 1 : Wil : EKW-Rakledvespero.
- 4 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Kultura seminario.
- 12 : Lausanne : LES-Zamenhofa Festo.
- 18 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

## 2011 Januare

- 5 : Luzern : LES-Kunveno.
- 10 : **Redakta datlimo de *SES informas*.**
- 10 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 22 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

## Februare

- 5 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Kultura seminario.
- 19 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

## Marte

- 5 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Kultura seminario.
- 10 : **Redakta datlimo de *SES informas*.**
- 19 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

Aldonaĵoj kunsenditaj (3):

**ENKETO ENE DE LA MEMBRARO DE SES 2010**

(Tiu enketo ankaŭ troviĝas sur [www.svisa-esperanto-societo.org](http://www.svisa-esperanto-societo.org).  
La enhavo estas nur por la uzo de la estraro. Mezaj nombroj  
aperos.)

**Nomo** :.....

**Antaŭnomo** :.....

**Stratadreso** :.....

**Loĝloko kun kodo** :.....

**Retadreso** :.....

**Tel hejma** :.....

**Tel portebla** :.....

**Naskiĝjaro** :.....

**Lingvaj konoj (pri plej multe da lingvoj) (bv indiki iom / mezbone /  
tre bone)** :.....

.....

**Profesio, konoj, scioj, kapabloj, spertoj** :.....

.....

**Ŝatokupoj** :.....

**Membro de UEA (jes/ne)** :.....

**Membro de aliaj e-aj (fak)organizoj ; kiuj ?**

.....  
**Ĉu vi ricevas la retmesaĝojn venantajn el la retlisto**

**« Svislando » (jes/ne)?.....**

**Se ne, ĉu vi deziras aliĝi al la retlisto « Svislando » ? .....**

**Sugestoj, proponoj al la estraro de SES:.....**

.....

.....

**Bv resendi tiun folion al M. Grosjean, pf 9, 2416 Les Brenets, antaŭ la  
fino de 2010. Vi povas fari tion rete : bv uzi mirejo.mireille @  
gmail.com. La estraro de SES elkore dankas vin.**

# Samedis de pratique de l'espéranto organisés par le CDELI à La Chaux-de-Fonds

pour les étudiants du cours par correspondance,  
les participants de cours du soir,  
les élèves de cours scolaires,  
les autodidactes

Quand on étudie l'espéranto en solitaire ou en prenant part à des cours, on ressent nécessairement le besoin de pouvoir pratiquer la langue sous la direction de pédagogues attentifs. Pour satisfaire ce besoin, le Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale (CDELI), de la Bibliothèque de la Ville de La Chaux-de-Fonds, organise régulièrement des samedis de pratique de l'espéranto qui sont largement ouverts à tous. Ils sont animés par Claude Gacond, l'archiviste du CDELI, Monika Molnar, Nancy Fontannaz et Luc Allemand.

## Dates des prochains samedis

### 3 groupes d'étude :

débutants, moyens, avancés.

**2010 : 25 septembre, 23 octobre, 20 novembre, 18 décembre, 22 janvier, 19 février, 19 mars.**

## Contribution

Lors de chaque samedi, il est demandé une contribution de Fr. 15.- (Gratuit pour les étudiants).

## Inscription

Pour faciliter l'organisation des rencontres, les personnes qui y viendront sont priées de s'annoncer jusqu'au jeudi précédent auprès de Nancy Fontannaz, en indiquant leurs nom, adresse et numéro de téléphone.

Mail: [nancy.fontannaz@gmail.com](mailto:nancy.fontannaz@gmail.com)

Téléphone: 021 728 31 27 (avec répondeur).

Supplément de Fr. 5.- pour ceux qui viennent sans s'être inscrit ou se sont inscrits après le jeudi précédent.

## Horaire des samedis

### **10.00 : Ouverture de la salle du CDELI :**

On peut acheter des livres neufs : manuels, dictionnaires, etc, et à très bas prix des ouvrages de brocante. Possibilité de discuter avec les enseignants du cours par correspondance.

**10.20 : Ouverture officielle** et formation des groupes d'étude.

**10.30 : 1<sup>ère</sup> période d'étude.** En général le travail se déroule dans la salle du CDELI et dans des salles attenantes que l'école met à notre disposition.

11.30: Pause café.

**11.45 : 2<sup>ème</sup> période d'étude.**

12.45 : Pause du repas de midi en commun dans un restaurant voisin. Chacun paie son repas sur place.

**14.15 : 3<sup>ème</sup> période d'étude.**

15.15 : Pause thé.

**15.30 : 4<sup>ème</sup> période d'étude.**

**16.30 : Conclusion de la rencontre** à la salle du CDELI, où il est possible de rester pour converser en prenant le thé, et pour acheter des livres, ceci jusqu'à sa propre heure de départ.

**17.30 : Clôture officielle.**

## Entrée du CDELI

Porte centrale nord du bâtiment de la Bibliothèque (Progrès 33). Si la porte est fermée, sonnez (bouton du CDELI) et quelqu'un viendra ouvrir. Montez au 2<sup>e</sup> étage.

## Pour atteindre la Bibliothèque

La Bibliothèque se trouve au numéro 33 de la rue du Progrès. De là gare, elle peut être atteinte par bus, N° 4 direction Hôpital. On peut acheter son billet dans le bus même. Demander l'arrêt "Bibliothèque".

Les automobilistes verront des écriteaux annonçant la bibliothèque. Parquer dans les rues du quartier, et non dans la cour.

**Au plaisir de vous rencontrer et de vous aider dans la pratique de l'espéranto.**

**Claude Gacond, Monika Molnar, Nancy Fontannaz et Luc Allemand.**



# Esperanto-Praxis an Samstagen

organisiert vom CDELI in La Chaux-de-Fonds  
für Fernkurs-, Abendkurs- und Schulkursteilnehmer  
sowie Selbstlernende

Wenn man Esperanto selbst lernt oder an Kursen teilnimmt, hat man notwendigerweise das Bedürfnis, die Sprache praktisch und unter Anleitung aufmerksamer Lehrer anzuwenden. Um diesem Bedürfnis entgegenzukommen, organisiert das Dokumentations- und Studienzentrum für die internationale Sprache (CDELI) der Stadtbibliothek La Chaux-de-Fonds regelmässig an Samstagen Praxiskurse, die jedermann zugänglich sind. Sie werden von Claude Gacond geleitet, dem Archivar des CDELI, unter Mitarbeit von Monika Molnar, Nancy Fontannaz und Luc Allemand.

## Nächste Kursdaten

### 3 Studiengruppen:

Anfänger, Mittlere, Fortgeschrittene.

**2010:** 25. September, 23. Oktober,  
20. November, 18. Dezember, 22. Januar,  
19. Februar, 19. März.

### **Kosten**

Pro Samstag wird ein Beitrag von Fr. 15.–  
erhoben (für Studenten kostenlos).

### **Anmeldung**

Um die Organisation zu erleichtern, werden die Teilnehmer gebeten, bis Donnerstag vor dem Kurs sich mit Name, Adresse und Telefonnummer bei Nancy Fontannaz anzumelden:

Tel. 021 728 31 27 (Telefonbeantworter) oder  
E-Mail: nancy.fontannaz@gmail.com

Fr. 5.– Zuschlag für jene Teilnehmer, die sich nicht bis Donnerstag angemeldet haben oder ohne Anmeldung kommen.

## Kursprogramm an Samstagen

### **10.00 : Öffnung des CDELI-Saals**

Es besteht die Möglichkeit, neue Bücher zu kaufen: Lehrbücher, Wörterbücher usw. oder billige gebrauchte Werke. Es besteht auch die Gelegenheit, mit den Lehrpersonen des Fernkurses ins Gespräch zu kommen.

**10.20 : Offizielle Eröffnung** und Studiengruppenbildung.

**10.30 : 1. Studienperiode.** Im Allgemeinen wird im CDELI-Saal oder in benachbarten Klassenzimmern, die von der Schule zur Verfügung gestellt werden, gearbeitet.

11.30 : Kaffeepause.

### **11.45 : 2. Studienperiode**

12.45 : Pause und gemeinsames Mittagessen in einem nahegelegenen Restaurant. Jede(r) Teilnehmer(in) begleicht selbst die Kosten an Ort.

### **14.15 : 3. Studienperiode.**

15.15 : Teepause.

### **15.30 : 4. Studienperiode.**

**16.30 : Abschluss des Studiensamstags** im CDELI-Saal, wo man verweilen kann, um Gespräche zu führen, Tee zu trinken oder Bücher zu kaufen, und zwar bis zur individuellen Abreisezeit.

**17.30 : Offizieller Türschluss.**

## **Eingang zum CDELI**

Mitteltüre auf der Nordseite des Bibliotheksgebäudes (Progrès 33). Sollte die Türe geschlossen sein, bitte läuten (Knopf CDELI), es kommt jemand, um Ihnen zu öffnen. Begeben Sie sich in den 2. Stock.

## **Wie erreiche ich die Bibliothek?**

Die Bibliothek befindet sich in der Rue du Progrès 33. Vom Bahnhof aus kann sie mit dem Bus Nr. 4 in Richtung Hôpital erreicht werden. Billette im Bus lösen. Sich nach der Haltestelle Bibliothèque erkundigen.

Die Automobilisten können den Schildern Bibliothèque folgen. Parkplätze in den Quartierstrassen, nicht im Hof der Bibliothek.

**Wir freuen uns, Sie kennenzulernen  
und Sie bei der praktischen Anwendung des Esperanto unterstützen zu dürfen.  
Claude Gacond, Monika Molnar, Nancy Fontannaz und Luc Allemand.**